EKZERCO DE LA 15-a LECIONO

1 - Amrikano loĝas en

- (a) Afriko
- (b) Ameriko
- (c) Azio
- (d) Eŭporo

2 - Arbaro en Brazilo estas

- (a) tropika ĝangalo
- (b) dezerto
- (c) polusa

3 - Kiom da brazilanoj estas en la klaso?

- (a) Ĉiuj estas brazilanoj
- (b) Neniu estas brazilano
- (c) Kelkaj estas brazilanoj

4 - Kanado estas

- (a) varmega lando
- (b) malvarmega lando
- (c) tropika lando

5 - Kiu estas la plej longa rivero en la mondo?

- (a) Afriko
- (b) Nilo
- (c) Amazono

6 - Urugvajo esta lando el

- (a) Nord-Ameriko
- (b) Sud-Ameriko
- (c) Mez-Ameriko

7 - Kial la meksikanoj ne elmetas la "Sombrero"?

- (a) ĉar estas nokto
- (b) ĉar la suno brilegas

8 - Li parolis pri si

- (a) Li parolis pri ŝia vivo
- (c) Li parolis pri nia vivo
- (d) Li parolis pri lia propra vivo

9 - Krum Meksikio kaj Kanado kiu estas la alia lando el Nord-Ameriko

- (a) Venezuelo
- (c) Gvatemalo
- (d) Usono

10 - Vintro estas sezono

- (a) Malvarma
- (b) Varma

TRADUK-EKZERCO

Procure no dicionário e traduza para o português.

Vintro, aŭtuno, printempo, kaj somero estas sezonoj de la jaro. Aŭtuno estas plena de floroj, dum somero la vetero estas varma, aŭtuno falas la folioj, kaj vintro estas pluvo kaj malvarmo.

ĜENERALA REVIZIO



La hodiaŭa juneco

Ni kiu estas maljunaj, aŭ se mi devas paroli la veron, mezaĝaj, pensas ke la hodiaŭa juneco estas straga. Ĉu ne? Kiam ni estis juna la mondo estis tre malsimila ol nuntempe. La vivo tiam iradis tre malrapide. Hodiaŭ ni estas kiel eksterlandanoj en nia propra lando. Ĉu vi iam vidis tiujn strangaj hodiaŭajn infanojn? Ili faras ĉiom samtempe, ili kuras, ludas muzikon, lernas

komputil-programojn kaj tiel plu (k.t.p). Ĉiuj diras, la hodiaŭaj infanoj estas pli inteligentaj, sed ĉu tio estas vera diraĵo? Estas vere, ke ili faras multajn aferojn samtempe, sed ĉu ili estas kreemaj, ĉu ili sukcesas fari ion pacience kaj bone. Mi pensas ke la infanoj kaj adoleskantoj de hodiaŭ ne havas tempon por esti infanoj, ne havas tempon por nenio, kaj tiu, kiu tiom faras en malmulta tempo vere faras nenion bone, ĉu ne? Estas multaj kompromisoj samtempe, la gepatroj enmetas ilin en kurson pri danco, kurson pri pentrado, k.t.p..., Ili, la gepatroj pensas ke tiel la infanoj estos pli inteligentaj kiam plenaĝuloj. Ĉu eblas ke en la infana cerbo oni enmetu tiom da pensaĵoj. La multe laboremaj infanoj ne sonĝas pri dolĉaj rakontoj sed pri komputilaj ludoj. Ili ne vidas la malrapida sunsubiro. Kies kulpo estas? Ĉu de la gepatroj? Ne, nenies, se mi bone memoras, kiam mi estis infanoj la grandaĝuloj ankaŭ paroladis la samajn diraĵojn kiajn mi diras al vi nun. Tia pensmaniero estas vere ordinara pensmaniero, kaj ĉiu epokoj ĝi aperas. Do viaj geavoj antaŭe pensadis sammaniere pri vi.



Kompleta Tabelo de Korelativoj

	Demandoj	Necertaj	Montraj	Tutaj	Neaj
Objekto	Kio	lo	Tio	Ĉio	Nenio
Persono	Kiu	lu	Tiu	Ĉiu	Neniu
Kvalito	Kia	la	Tia	Ĉia	Nenia
Loko	Kie	le	Tie	Ĉie	Nenie
Nombro	Kiom	lom	Tiom	Ĉiom	Neniom
Maniero	Kiel	lel	Tiel	Ĉiel	Neniel
Tempo	Kiam	lam	Tiam	Ĉiam	Neniam
Kaŭzo	Kial	lal	Tial	Ĉial	Nenial
Posedo	Kies	les	Ties	Ĉies	Nenies

DEK-SESA LECIONO



Pentroleciono

Estas lundo, Nia amikino Petrino nun estas en la leciono pri pentrado. Ili lernas kiel pentri, desegni kaj kolorigi la desegnojn. La

instruistino diras ankaŭ kiel beligi ilian desegnojn per specialaj teknikoj. Ni uzas diversajn kolorkrajonojn. La pentraĵoj fariĝas pli kaj pli belaj. La instruistino daŭrigas la lecionon kaj diras: Nun, ni pensu pri nova desegno. Ni desegnu praŭrbon, aŭ urbon ege malnovan. Ĉu vi sukcesas pensi pri urbo tia? Ni malfermu la deseg-paperujon kaj ni komencu ĝin nun. Ĝuste tiam la pordo malfermiĝas kaj alia lernantino eniris en la klasĉambron. Ŝi diris: Ĉu la leciono jam finiĝas? Ne, respondis la instristino, fakte, mi finos la lecionon post kelkaj minutoj, ankoraŭ estas tempo por ke vi partoprenu. Ĉiuj lernantoj desegnas sur la sama papero, unu faras homojn aliaj faras domon k.t.p. La instruistino estas kontenta kaj venigas novan blankan paperon por la lernantoj.

Sufiksoj

-uj

Krajono - Krajonujo

-ig

Verbo ne tranzitivo → **ig** → Verbo Tranzitivo

Adjektivo → Verbo (fari)

Substantivo → Verbo (fari)

Verbo tranzitivo → fari ke, ordoni

-iĝ

Verbo tranzitivo → **iĝ** → Verbo ne tranzitivo

Adjektivo → Verbo (fari por si mem)

Substantivo → Verbo (fari por si mem)

Prefiksoj

-pra

1- O Sufixo -ig tem as seguintes utilizações:

(a) Tornar transitivo (com acusativo) um verbo

intransitivo. Ex: Esti (ser, estar) - Estigi (formar, causar)

Ĉesi (cessar) - Ĉesigi (terminar, fazer cessar)

(b) Com adjetivos ou substantivos - tornar, fazer. Ex: Bela (bela) -

Beligi (embelezar), Klarigi (esclarecer), Krucruco (cruz) - krucigi (cruzar),

Ruino (ruína) - Ruinigi (arruinar)

2- O Sufixo -iĝi tem as seguintes utilizações:

(a) Tornar intransitivo (sem acusativo) um verbo transitivo) Ex: Komenci

(começar, dar começo) - Komenciĝi (Começar)

(b) Com adjetivos e substantivos - tornar-se, fazer-se. Ex: Pala (palida) - paliĝi (amplidecer)

Edzo (marido) - Edziĝi (casar-se)

3- O prefixo pra- indica antigo Ex: praarbaro (floresta antiga)

4- O Sufixo -uj indica o continente total Ex: sukero (açucar) - Sukerujo (açucareiro)

Vocabulário:

Objetos/Coisas (Substantivos)

Desegno	- Desenho
Tekniko	- Técnica
Krajono	- Caneta
KolorKrajono	- Caneta de cor
Pentraĵo	- Pintura
Urbo	- Cidade
Praŭrbo	- Cidade antiga
Paperujo	- pasta, caixa de papéis
Minuto	- Minuto
Tempo	- Tempo
Papero	- Papel
Lundo	- Segunda-feira

Qualidades (Adjektivos)

Speciala	- Especial
Diversa	- Diversa
Sama	- mesma/o
Tropika	- Tropical

Adverbios

Fakte	- De fato
Ankoraŭ	- Ainda

Verbos

Venigi	- Mandar vir
Pentri	- Pintar
Desegni	- Desenhlar
Kolorigi	- Colorir
Beligi	- Embelezar
Uzi	- Usar
Fariĝi	- Tornar-se
Daŭri	- Continuar
Daŭrigi	- Continuar

EKZERCO DE LA 16-a LECIONO

1 - PentrArto

- (a) Arto de pentrado
- (b) Arto de laborado
- (c) Arto de kurado

2 - Venigi

- (a) Veni al loko
- (b) Fari veni
- (c) Veni rapide

3 - En "La pordo fermiĝas", kiu ferma sia pordon

- (a) Alia persono
- (b) La pordo mem

4 - Varmigi estras

- (a) igi pli malvarma
- (b) igi pli varma
- (c) igi pli bona

5 - Kiu eniris en klasĉambron?

- (a) Alia instruistino
- (b) Alia lernanto
- (c) Alia lernantino

6 - Kio estas desegni?

- (a) Fari arton surpapere
- (b) Fari manĝaĵon
- (c) Fari nenion

7 - Per kio oni kolorigas la desegnojn?

- (a) Per kolorkraĵonoj
- (b) Per martelilo

8 - En kie oni enmetas la monon?

- (a) en skatolon
- (c) en monujon

9 - La prahomoj faris desegnoj, kiu estas prahomoj

- (a) Niaj amikoj
- (c) Niaj praparencoj
- (d) Niaj bestoj

10 - La leciono daŭras, mi _____ la lecionon.

- (a) estas
- (b) daŭrigas
- (c) finiĝas

TRADUK-EKZERCO

Procure no dicionário e traduza para o português.

La monatoj de la jaroj estas Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro kaj Decembro en la tuto esta dek du monatoj en la jaro.

DEK-SEPA LECIONO



Infanrakontoj

Estas mardo, en la kuranta leciono la instruistino rakontas al la gelernantoj infanajn rakontojn. Ŝi estas diranta rakonton de la Fratoj Grim. Ĉu vi konas ilin? Ŝi diras: “Foje estis regno, kie

malbona viro uzanta la reĝan kronon faris malbonaĵojn al la malriĉuloj”. La plej juna lernanto demandas, ĉu ekzistis malbona reĝo? Jes, respondis la instruistino, personoj malbonagantaj ĉiam ekzistos. La lernanto demandinta ekkomprenas. Estas vere ĉie en la mondo estas personoj malbonfarontaj. La leciono fluas bonege kaj ankaŭ la fluantaj horoj estas agrablaj. La instruistino diras: En la venonta leciono mi daŭrigos la rakonton pri la malbona reĝo. Kiam la instruisto estas forironta el la klaso ŝi rimarkigis la neforgeseblan farotajn hejmajn ekzercojn. Do, ne forgesu!

Aktivaj Participoj

Adjektivo	
-inta	Kiu -is
-anta	Kiu -as
-onta	Kiu -os
Substantivo	
-into	Tiu kiu -is
-anto	Tiu kiu -as
-onto	Tiu kiu -os

1-A vóz ativa possui sufixos Ex:

kurinta	- que correu
kuranta	- que corre
(corrente)	
kuronta	- que correrá

Vocabulário:

Objetos/Coisas (Substantivos)

Malriĉulo	- Pobre pessoa
Regno	- Reino
Reĝo	- Rei
Krono	- Coroa
Malriĉulo	- Pobre
Horo	- Hora
Rakonto	- Conto
Mondo	- Mundo
Mardo	- Terça-feira

Qualidades(Adjativos)

Kuranta	- Corrente
Diranta	- Que diz
Uzanta	- Que usa
Demandinta	- que perguntou
malbonaganta	- que age mau
malbonfaronta	- que fará o mau
fluanta	- que flui
venonta	- que vira
forironta	- que sairá
neforgesebla	- inesquecível
faronta	- que fará
hejma	- domestica
Riĉa	- Rico
Malriĉa	- pobre

Verbos

Agir	- Agir
Flui	- Fluir
Daŭri	- Continuar
Daŭrigi	- dar continuidade
Rimarki	- Notar
Rimarkigi	- Fazer notar
(ressaltar)	

EKZERCO DE LA 17-a LECIONO

1 - La kuranta leciono estas

- (a) La leciono kiu kuris
- (b) La leciono kiu ne kuris
- (c) La leciono kiu kuras

2 - Personoj malbonfarontaj

- (a) estas personoj kiuj faros malbonon
- (b) estas personoj kiuj faris malbonon
- (c) estas bonaj personoj

3 - La erarintaj knaboj

- (a) Hieraaŭ eraris
- (b) Nun eraras
- (c) Morgaŭ eraros

4 - Kiu faris malbonaĵojn al la malriĉuloj?

- (a) Instruisto
- (b) Lernanto
- (c) Reĝo

5 - Kiu ĉiam ekzistos?

- (a) Malbonaj bestoj
- (b) Malbonaj instruistoj
- (c) malbonaj personoj

6 - Lerninto esta tiu kiu

- (a) jam vivis
- (b) jam lernis
- (c) jam venis
- (d) ankoraŭ ne lernis

7 - Porinfana kastelrakonto estas

- (a) Rakonto pri la vivo por infanoj
- (b) Rakonto pri Kasteloj por infanoj

8 - Kiam la instruisto estas forironta

- (a) La instruisto jam foriris
- (b) La instruisto ankoraŭ ne foriris

9 - Rimarkigi estas

- (a) fari nenion
- (c) fari ke la personoj rimarku
- (d) Rimarki ege

10 - Afero ne farebla estas

- (a) Afero ne ebla vidi
- (b) Afero ne ebla fari
- (c) Afero ne ebla veni

TRADUK-EKZERCO

Procure no dicionário e traduza para o português.

Je la sesa antaŭtagmeze mi leviĝas el mia lito, je unua postagmeze mi tagmanĝas kaj je la sesa kaj kvarono mi revenas hejmen. La horloĝo kontrolas mian vivon.

DEK-OKA LECIONO



Lanĉohoro

Merkrede, dum la lanĉohoro, je la 3-an postagmeze, en la lernejo la infanoj estas tre ekscititaj. Ili manĝas kukojn, panojn kaj aliajn ulojn.

La kompatindaj fruktoj kiel bananoj kaj pomoj estas manĝataj rapide. Kelkaj estas englutitaj pere de unu sola gluto, aliaj englutotaj fuĝas ĉiudirekte. Estas vere, malbela sceno, vidi malfeliĉulojn esti detruitaj. Antaŭ ol la respondeculo sonorigas la ĝustan horon, la kompatinduloj estas preskaŭ ekstermitaj, kiam komenciĝas la terurhoru la morto alvenas rapide. Ĉu vi neniam vidis tiajn barbarajn scenojn? Bedaŭrinde mi vidas ĝin ĉiutage. Mi vidas kun naŭziga sento, ŝajnas ke nenio en la mondo savos ilin, sed alvenas la fino de la lanĉohoro. La restantaj spiras trankvilaj. Estas la fino, al tiuj kiuj ne estis manĝitaj restas nur atendi malrapidan morton en la lanĉovalizo pro la putrado. Kaj je la 15-a kaj duono postagmeze la torturado finiĝas.

Sufiksoj

-inda

Kiu devas esti ...

Pasiva Participoj

Adjektivo	
-ita	jam finita
-ata	La ago daŭras
-ota	La ago ankoraŭ ne komenxiĝis
Substantivo	
-ito	Tiu kiu -ita
-ato	Tiu kiu -ata
-oto	Tiu kiu -ito

1-A vóz pasiva possui sufixos Ex:

Manĝita - Foi comida
 Manĝata - esta sendo comido
 Manĝota - será comido

2- O Sifixo -inda indica algo que dever ser .. Ex: rimarkinda (que deve ser notado, notável), Kompatinda (digno de pena, infeliz)

Vocabulário:

Objetos/Coisas (Substantivos)

Lanĉohoro - Hora do lanche
 Kuko - Bolo
 Pano - Pão
 Frukto - Fruta
 Banano - Banana
 Pomo - Maçã
 Gluto - Gole
 Kompatindulo - Coitado
 Teruro - Terror
 Morto - Morte
 Terurhoru - Hora do Terror
 Sceno - Cena
 Sento - Sentimento
 Savito - Salvo
 Putrado - Apodrecimento
 Merkredu - Quarta-feira

Qualidades(Adjetivos)

Ekscitita - Agitado
 Kompatinda - Infeliz
 Manĝata - Sendo comido
 Englutita - Engolido/a
 Englutota - para ser Engolido
 Ĝusta - Justa/o
 Terurita - Aterrorizado
 Barbara - Bárbaro/a
 Naŭziga - Enauzeante
 Trankvila - Tranquilo/a

Verbos

Eksciti - Agitar, escitar
 Engluti - Engolir
 Detrui - Destruir
 Sonorigi - Fazer soar
 Komenciĝas - Começar
 Ŝajni - Parecer
 Savi - Salvar
 Atendi - Esperar

Outros

Je - preposição sem significado, uzada para horas etc..

EKZERCO DE LA 18-a LECIONO

1 - La 3-a postagmeze estas

- (a) 3:00
- (b) 14:00
- (c) 15:00

2 - Sandviĉo estas

- (a) lando el Eŭropo
- (b) eta manĝaĵo
- (c) nomo de rivero

3 - Banano kaj pomoj estas

- (a) plantoj
- (b) floroj
- (c) fruktoj

4 - Kiu fuĝas ĉiudirekte?

- (a) aliaj personoj
- (b) aliaj insektoj
- (c) aliaj manĝaĵoj

5 - Savito kaj savinto estas

- (a) Kiu estis savita kaj tiu kiu savis
- (b) Kiu estis savota kaj tiu kiu savos
- (c) Kiu estis savata kaj tiu kiu savas

6 - Ŝajni =

- (a) esti simila
- (b) esti malsimila
- (c) esti nesimila

7 - Kiu terurras ja kompatindaj manĝaĵoj?

- (a) La bestoj
- (b) La homoj
- (c) La infanoj

8 - Dum la lanĉohoro la infanoj devas

- (a) Labori
- (c) Manĝi
- (d) Foriri

9 - Respektinda estas persono

- (a) kiun ni devas obei
- (c) kiun ni devas pardoni
- (d) kiun ni devas respekti

10 - Naŭziga sento estas

- (a) bona sento
- (b) malbona ago
- (c) malbona sento

TRADUK-EKZERCO

Procure no dicionário e traduza para o português.

En la kapo ni havas la nazon, la buŝon, la orelon kaj la okulojn. En la korpo ni havas brakojn kaj krurojn. En la mano ni havas fingrojn kaj en la fingroj ni havas ungojn.

DEK-NAŬA LECIONO



La infanoj revenas hejmen

Jaŭde, estas la lasta horo en la lernejo, la infanoj jam estas pretaj por foriri. Aŭdonte la sonorilo ili prepariĝas por tuj ekkuri trans la pordego de la salono. Kaj fine ek la sonorilo aŭdigas

sian belan sonon laŭte tra la tuta lernejo. La frenezaj infanoj komprenante la mesaĝon preskaŭ samtempe baraktadas kiel insektoj. Baldaŭ ondo da diverskoloraj infanoj transpasas la pordego al la ekstera mondo. Antaŭsciante la danĝeron, eta hundo flanken iras kaj atendas ĝis la lasta knabo eliris. Kaj fine la lernejo estas silenta, la instruistoj estas lacaj kaj sentas sin malpezaj. Sed intime ili scias ke en la venonta tago, ĉio rekomencos, kaj ili ankaŭ foriras, sed nun pensante, se ne ekzistus la infanoj, ilia vivo taŭgus por nenio. En la strato oni ankoraŭ vidas kelkajn, sin puŝantaj kaj kurantaj, ĝis la strato fariĝas denove kvieta. Do, finite la lernejtago la mondo silentis.

Adverbaj Participoj

dum mi dormis, mi sonĝis - dormante mi sonĝis

1-Os participios adverbiais ou gerúndio em Esperanto são muito práticos, indicam relação de tempo, maneira ou causa entre o participio e o verbo principal.Ex:

Dum mi dormis, mi sonĝis = dormante mi sonĝis.

Kiam ŝi kisis ŝi fermis la okulojn = kisante ŝi fermis la okulojn

Post kiam Karlo vekigis, li tuj eklaboris = Vekiginte Karlo tuj eklaboris

Vocabulário:

Objetos/Coisas (Substantivos)

Sonorilo	- Sineta
Salono	- Salão
Sono	- Som
Mesaĝo	- Mensagem
Insekto	- Inseto
Ondo	- Onda
Porto	- Porta
Pordego	- Portão
Danĝero	- Perigo
Flanko	- Lado
Strato	- Rua
Jaŭdo	- Quinta-feira
Mondo	- Mundo

Qualidades(Adjetivos)

Lasta	- Última/o
Preta	- Pronta/o
Tuta	- Todo/a
Freneza	- Imaluco, doido
Ekstera	- Esterno/a
Silenta	- Silencioso/a
Laca	- cansado/a
Peza	- Pesado
Malpeza	- Leve
Kvieta	- Quieto/a

Adverbios

Aŭdonte	- ouvindo (antes de acontecer)
Komprenante	- Compreendendo
Samtempe	- Ao mesmo tempo
Flanke	- ao lado
Fine	- Finalmente
Laŭte	- Em som alto

Verbos

Barakti	- Movimentar
Pasi	- Pasar
Transpasi	- Ultrapasar
Atendi	- Esperar
Taŭgi	- Sevir(prestar)
Puŝi	- Empurrar
Fari	- Fazer
Fariĝi	- Tornar-se
Silenti	- Silenciar
Prepari	- Preparar
Prepariĝi	- Preparar-se
Aŭdi	- Ouvir
Aŭdigi	- Fazer ouvir
Kredi	- Acreditar
Kompreni	- Compreender

Outras

Trans	- Alem de,
Tra	- Através de

EKZERCO DE LA 19-a LECIONO

1 - Kio okazas en la lasta horo?

- (a) La infanoj dormas
- (b) La infanoj kuras
- (c) La infanoj prepariĝas por foriri

2 - Kiam ili ekkuras?

- (a) Kiam la sonorilo aŭdigas sian belan sonon
- (b) Kiam la sonorilo kantas
- (c) Kiam la sonorilo parolas

3 - Barakti kiel insektoj estas

- (a) Moviĝi malrapide
- (b) Moviĝi rapide kiel insektoj
- (c) Ne Moviĝi kiel insektoj

4 - Antaŭsciante estas

- (a) antaŭvidi la futuron
- (b) antaŭvidi la vivon
- (c) antaŭvidi nenion

5 - Finite

- (a) Post estas finita
- (b) Dum estas finata
- (c) Antaŭ estas finota

6 - La bestoj manĝas aliajn bestojn por

- (a) Ludi
- (b) Paroli
- (c) Vivi
- (d) Vojaĝi

7 - Trans la strato estas

- (a) En la strato
- (b) Post la strato

8 - TraKuri

- (a) kuri tra la tuta ...
- (c) kuri trans la ...
- (d) Kuri multege

9 - Kiu esta laca?

- (a) La knabo
- (c) La hundo
- (d) La instruisto

10 - Sen la infanoj

- (a) La vivo ne taŭgus por nenio
- (b) La vivo taŭgus por nenio
- (c) La vivo taŭgus por io

TRADUK-EKZERCO

Procure no dicionário e traduza para o português.

Tiri kaj puŝi estas bonaj verboj, oni tiras la fiŝojn el la akvo, kaj oni puŝas la aŭtomobilon kiam ili paneas.

DUDEKA LECIONO



La spirito de la lingvo

Ĉiu lingvo havas sian propran spiriton, ne temas pri fantomoj sed pri ia sammaniere netuŝebla,

neklarigebla

afero. Kiam oni diras “en la mezo de la nokto” kaj “meznokte” oni sentas ke la dua esprimmaniero estas laŭ la spirito de Esperanto kaj la unua ne. Kial? Kiel mi jam diris estas miksaĵo da senmateria kaj subtila substancoj.

Zamenhof diris: «*La vera stilo Esperanta estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas - aŭ almenaŭ devas esti - nur stilo simpla kaj logika*»

Mi ne kapablas diri al vi, kio estas la spirito de Esperanto, vidu alian ekzemplon de Clauĉe Piron (La Bona Ligvo): “en tiu epoko li praktikis sporton kun vigleco” kaj “tiuepoke li vigle sportis” la dua impresas pli esperante ol la unua. Fakte ankaŭ la esprimo, kiun mi ĵus uzis, “impresas pli esperante”, estas pli laŭ la spirito de la lingvo ol “donas impreson de pli esperanta frazo”. Dum miaj interparoladoj en la interreto mi aŭdis de ĉina samideanino la jenajn vortojn: “Ĉi tie sunas kaj belas, estas printempo en Pekino”. Do mi pensas fine ke la nura maniero por akiri la spiritecon de Esperanto estas multe legi, mia lasta konsilo al vi ĉiuj, miaj lernantoj, estas: legu kaj penu akiri la spiriton de Esperanto.

Vocabulário:

Objetos/Coisas (Substantivos)

Spirito	- Espírito
Fantomo	- fantasma
Afero	- Coisa, causa
Substanco	- Substância
Miksaĵo	- Mistura
Stilo	- Estilo
Sporto	- Esporte
Esprimo	- Expressão
esprimManiero-	Maneira de expressão
Tiuepoke	- en tiu epoko
Vigle	- Vigorosamente

Qualidades (Adjetivos)

Ordinara-	Comum
Saĝa	- Sabio/a
Egala	- Iguais
Interesa	- Interessante
Interreto	- Internet
Printempo	- primavera
Pekino	- Pequim
Konsilo	- Conselho
Netuŝebla	- intocável
Neklarigebla	- Inexplicável
Senmateria	- Imaterial
Slava	- Eslovo/a
Germana	- Alemão/a
Romana	- Romana/o
Simpla	- Simples
Logika	- Lógico/a
Nura	- Única
Subtila	- Sutil

Adverbios

Sammaniere	- Da mesma maneira
Meznokte	- No Meio da Noite

Verbos

Impresi	- Imprimir
Tuŝi	- Tocar
Respekti	- Respeitar
Kredi	- Acreditar
Akiri	- Adquirir
Praktiki	- Praticar
Temu	- Se tratar (assunto)
Suni	- Fazer sol
Belas	- Estar belo/a

ĜENERALA REVIZIO

Aktivaj Participoj

Adjektivo	
-inta	Kiu -is
-anta	Kiu -as
-onta	Kiu -os
Substantivo	
-into	Tiu kiu -is
-anto	Tiu kiu -as
-onto	Tiu kiu -os

Pasiva Participoj

Adjektivo	
-ita	jam finita
-ata	La ago daŭras
-ota	La ago ankoraŭ ne komenxiĝis
Substantivo	
-ito	Tiu kiu -ita
-ato	Tiu kiu -ata
-oto	Tiu kiu -ito

Sufiksoj

-inda

Kiu devas esti ...

-uj

Contingente de um todo, árvore, país
 Kraĵono (caneta) - Kraĵonujo (estojo)
 Frago(morango) - Fragujo (morangueiro)
 Francujo - Franĉa

-ig

Verbo ne tranzitivo → **ig** → Verbo Tranzitivo
 Adjektivo → Verbo (fari)
 Substantivo → Verbo (fari)
 Verbo tranzitivo → fari ke, ordoni


-iĝ

Verbo tranzitivo → **iĝ** → Verbo ne tranzitivo
 Adjektivo → Verbo (fari por si mem)
 Substantivo → Verbo (fari por si mem)

Prefiksoj

-pra

Antigo → Prahomo - Aĉstral, home das cavernas



MALSANOJ DE PLUŜURSOJ



La dorlotbestoj ekzistas en multaj landoj kaj estas konataj per diversaj nomoj. Tamen, la aŭtoroj opiniis, ke la specio estas fakte la sama en ĉiuj mondpartoj. Unu atesto pri tio estas, ke jen kaj jen oni sukcesis grefti gambojn, brakojn, eĉ kapon, de unu besto al alia. La aŭtoroj eltrovis, ke 63,8 % el britaj domoj estas enloĝataj de unu aŭ pli da pluŝursoj kaj estas forta korelativeco inter la nombro de pluŝursoj kaj la nombro de infanoj en

iu domo. La aŭtoroj provis ekzameni 1 598 pluŝursojn kaj akiri detalajn klinikajn antecedentojn; tamen ili ne povis ekzameni unu pluŝurson pro karanteno de la domo (la posedanto suferis rubeolon).

La aŭtoroj ankaŭ streĉis en infanvartejoj kaj malsanulejoj por infanoj en la regiono de Londono kaj trovis 539 diversajn partojn, ofte en malbona stato. Post purigo kaj greftado de la partoj ili sukcesis restaŭri entute 136 pluŝursojn. Restis unu dekstra orelo, kiun ili konservis en likva nitrogeno por eventuala estonta uzo. Ili ekzamenis ĉiun pecimenon ekstere pri stato de la felo, pri eblaj membromankoj, pri la stato (kaj eble mankoj) de la okuloj kaj oreloj. Ili ankaŭ taksis la staton de la remburajo kaj notis iun ŝiron en la felo kun liko de rembura ŝtopaĵo. Ili ankaŭ psikologie ekzamenis la bestetojn, precipe per taksado de la vizaĝmienoj, ĉu la etaj kreaĵoj aspektas feliĉaj. Tre ofta malsano de la studitaj pluŝursoj estis alopecio aŭ haromanko.

La precipa kaŭzo de la alopecio ŝajnis esti troa frotado. Ĉar la plej haromankaj pluŝursoj estis ankaŭ inter la plej feliĉaj (laŭ observitaj mienoj), la aŭtoroj konkludis, ke alopecio ĝenerale respegulas la kvanton de amo inter infano kaj urseto. Ofte observita, sed ne klinike grava malsano estis streĉo kaj plilongigo de unu brako, la rezulto de longdaŭra metodo de transporto. Unu pluŝurso suferis strangan strabismom. Atenta ekzameno malkovris, ke ĝi perdis unu naturan okulon kaj iu nesperta riparinto penis anstataŭigi ĝin per ŝubutono. Unu besteto suferis tordon de la nuko kaj mankon de unu brako. Enketo pri la kaŭzo indikis, ke tiu estis rezulto de disputo inter du infanoj pri posedrajtoj. Unu pluŝurso suferis sindromon de saturita orelo. Oni sukcesoplene

resanigis la dorlotbeston per purigo de la orelo kaj milda sekigo en varma loko super la forno. Kelkaj pluŝursoj suferis psikologian malsanon. La plimulto el tiuj loĝis solaj en polvoplenaj ŝrankoj kaj subtegmentaj fatrasĉambroj. Studo de tiu grupo montris, ke preskaŭ ĉiam la kaŭzo estis neglekto. La maturiĝanta infano ial perdis intereson iom post iom pri la pluŝulo.

Estis tutklare, ke tiuj ursetoj suferis pro manko de atento kaj amo. La Aŭtoroj rekomendas tujan adoptigon de la urseto al infano, kiu povas ami ĝin, kiel la plej bona solvo. Ili asertas, ke „pluŝurso sen amo estas nefeliĉa pluŝurso”. La aŭtoroj nesurprize konkludas, ke la kuracado de malsanoj de pluŝursoj estas ĝuste ne la fako de veterinara medicino kaj ne en tiu de zoologiaj ĝardenistoj. Ili forte kondamnas la ideon, ke ĉiofarantoj kaj fuŝriparistoj rajtas diletanti en delikataj aferoj, kiuj vere bezonas profesiajn atenton kaj juĝon. Ili rekomendas tujan starigon de kurso pri malsanoj de pluŝursoj en ĉiuj veterinaraj fakultatoj.

Steĉjo
(laŭ artikolo de la veterinara ĵurnalo)

Kaj nun?



Ĉu vi aŭdis pri terkulturisto, kiu printempe semas siajn kampojn, sed aŭtune, kiam la greno maturiĝis, ne rikoltas ĝin? Ĉu vi vidis homon, kiu aĉetas biciklon aŭ aŭtomobilon, sed anstataŭ uzi ĝin por siaj bezonoj kaj plezuro, senzorge formetas kaj forgesas ĝin ie kaj daŭrigas iradi piede? Ĉu vi konas iun, kiu havigas al si modernan radioaparaton, sed eĉ unu fojon ne provas ĝiajn kapablojn? Bedaŭrinde ekzistas homoj, kiuj lernas Esperanton, sed baldaŭ laciĝas kaj perdas la intereson, forlasas kaj forgesas la tutan aferon. Ili semis, sed ili ne volas rikolti, lasante la fruktojn defali kaj putri. Ili elspezis tempon kaj monon – tute vane! Ĉar lingvo estas kiel tranĉilo, kiu rustiĝas, kiam oni ne uzas kaj prizorgas ĝin. Jam dum unu-du jaroj oni povas forgesi grandan parton de tio, kion oni lernis, kiam oni ne refreŝigas sian memoron. Certe vi, kiu legas tiujn ĉi liniojn, ne apartenas al tiaj senpripensaj, facilanimaj kaj senkarakteraj homoj, kiuj turniĝas laŭ la vento. Se vi foje komencis iun aferon, vi ankaŭ finos ĝin! Daŭrigu la laboradon pri Esperanto, refreŝigante viajn sciojn kaj perfektigante vin en la lingvo, ankaŭ praktike uzante ĝin. Por tio mi donas al vi jenajn konsilojn:

1. Abonu kaj legu regule almenaŭ unu Esperantan **gazeton**, kiu tenos vin en kontakto kun la tuta Esperanta mondo kaj plivastigos vian spiritan horizonton. Se vi estas malriĉa kaj ne havas sufiĉe da mono por aboni iun gazeton, formu «akcian societeton» el kelkaj viaj gekonatoj kaj abonu la gazeton kune kun ili, laŭvice legante ĝin.

2. Legu la ampleksan kaj interesan Esperantan **literaturon**, kie apud originalaj verkoj ekzistas tradukoj el kelkaj dekoj da lingvoj, multaj el ili tiaj, kiaj certe ne troviĝas en via propra lingvo. Per Esperanto vi povas konatiĝi kun la japana, hungara, ĉeĥoslovaka, pola, sveda, kataluna, estona, latva kaj aliaj literaturoj, kiuj estas malmulte konataj eksterlande. Ne nur legu, sed ankaŭ **aĉetu** Esperantajn librojn, ĉar tiel vi ebligas al la eldonejoj aperigi ĉiam novajn kaj novajn librojn. Aĉetu ĉiujare almenaŭ unu solidan libron

kaj kolektu al vi iom post iom malgrandan Esperantan bibliotekon, kiu estos ornamo kaj fiero de via hejmo. Por havi ĉiam freŝan legmaterialon, fondu **legrondon** inter viaj Esperantaj gekonatoj! La rondo povas konsisti el ekzemple 5 membroj, kiuj kunmetas monon por aĉeti tiom da libroj kiom da rondanoj estas. Laŭvice oni legas la librojn kaj poste dislotumas ilin inter si. Instigu ankaŭ vian Esperantan klubon fondi al si bibliotekon kaj la urban bibliotekon havigi al si Esperantajn librojn. Bedaŭrinde la homoj kutime ne havas tempon por legi Esperantajn librojn. Sed ne estas ja necese legi dum la tuta tago! Sufiĉas, se vi legos ĉiutage almenaŭ 15 minutojn aŭ duonhoron. Tiom da tempo povas trovi eĉ la plej okupata homo, ekzemple post la tagmanĝo, antaŭ la endormiĝo k.t.p.

Legante ĉiutage nur 5 paĝojn, oni povas tralegi dum la jaro kelkajn dikajn librojn. Necesas nur bona volo kaj konstanteco!

3. Tre utila kaj interesa estas **korespondado** kun eksterlandanoj. Per tia korespondado vi havos ne nur bonan ekzercon en Esperanto, sed vi havigos al vi ankaŭ amikojn en fremdaj landoj, vi ekscios pri la vivkondiĉoj kaj pensmaniero de aliaj popoloj kaj ĉiamaniere plivastigos vian horizonton. Adresojn por korespondado oni povas trovi en la Esperantaj gazetoj, aŭ prefere mem anoncu pri via deziro en iu gazeto. En tiu okazo oni devas almenaŭ unu fojon respondi al ĉiu skribinto.

4. Inter la esperantistoj **parolu nur Esperante**, ĉar vian gepatran lingvon vi povas paroli ĉie tiom, kiom vi deziras, sed Esperante vi povas paroli malofte kaj nur kun la esperantistoj. Tial eluzu ĉiun okazon por paroli Esperante! Komence tio kompreneble estas malfacila kaj peniga, vi devas serĉi vortojn, balbutas kaj faras erarojn, sed ĉe diligenta ekzercado vi baldaŭ rimarkos, ke vi povas jam tute libere esprimi viajn pensojn en la nova lingvo.

5. Ne pre aliĝu al via loka **Esperanta klubo** kaj pere de ĝi al la landa asocio kaj partoprenu la internacian movadon. En la klubo ne estu «meblo», kiu nur pagas sian kotizon, sed alie tute ne partoprenas la kluban vivon. Ne, estu **vera, aktiva membro**, kiu partoprenas ĉiujn ĝojojn kaj malĝojojn de la klubo, kiu regule vizitas la kunvenojn, kunagas en la programoj kaj ĉiuj entreprenoj de la klubo, memorante, ke Esperanto estas nia komuna posedaĵo kaj ke **ni ĉiuj devas labori por ĝi**. Se iu opinias, ke li ne havas multe da utilo de la klubo, li konsideru ankaŭ tion, ke **la klubo**

bezonas lin, ĉar maro konsistas el akvogutoj, kaj ju pli multnombraj kaj fortaj estas la kluboj, des pli forta estas ankaŭ la tuta movado.

6. Se vi havas radio-aparaton, aŭskultu regule la Esperantajn dissendojn el la diversaj landoj kaj ne forgesu sendi al la stacioj poŝtkarton kun danko. Alie la stacio ne scias ja, ke vi aŭskultis ĝin, kaj ricevinte neniujn aŭ tro malmultajn sciigojn pri aŭskulto, la stacio baldaŭ ĉesigos siajn Esperantajn dissendojn.

7. Por certigi pri viaj scioj en Esperanto kaj ricevi diplomon pri tio, absolvu superan ekzamenon ĉe via landa asocio. Zorge tralerninte tiun ĉi libron kaj leginte la necesan literaturon, vi devos esti kapabla por tio.

Troviĝas homoj, kiuj diras, ke ili ne bezonas Esperanton, ĉar ili **povas** tre bone vivi ankaŭ sen ĝi, tute vere oni povas, same kiel oni povas vivi sen biciklo, sen aŭtomobilo, fervojo, aeroplano, telefono, telegrafo, gramofono, kino, radio k.t.p. Sed tiuj produktoj de la moderna tekniko povas fari nian vivon pli agrabla kaj komforta. Same ankaŭ Esperanto, kvankam ĝi ne apartenas al niaj nepraj vivbezonaĵoj, povas plikomfortigi nian kulturan nivelon. Ĉar en nia tempo ĝi estas jam vera kulturfaktoro, kiu spirite proksimigas nin al la aliaj popoloj kaj ilia kulturo. Ni do eluzu Esperanton en ĝia rolo de internacia lingvo! Kaj samtempe ni ne forgesu malfermi ankaŭ la okulojn de la «nekredemaj Tomasoj» kaj ĉiamaniere labori por la progreso kaj disvastiĝo de Esperanto!

(el Seppik)

ENHAVO

A Missão do Esperanto

Mesaĝo de la spirito Emmanuelo

História da Lingua

Malgranda Historieto de la Lingvo

Unua Leciono

Prononco, La, kaj, -in, mal-, -o, -a, vir-, Pluralo (-j)

Dua Leciono

Estas, de, ankaŭ, ge-, -ar

Tria Leciono

-as, Li, Ŝi, Ĝi, Ili, al, en, la plej, -ul

Kvara Leciono

Akuzativo (-n), -i, -ist, -ant,ne, jes, -ej, sur, lia, ŝia, ĝia

Kvina Leciono

-e, -et, -u, Mi, sur, apud, kun

Ĝenerala Revizio

Sesa Leciono

sub , -eg, Ni, Vi, Nia, Via, -an, tro, multe da, do

Unua Ekzameno

Sepa Leciono

-is, -os, inter, sen, numeroj, -on, -obl, ĝis, re-

Oka Leciono

Per, Akuzativo de direkto, el, antaŭ, ambaŭ, ek-, -il

Naŭa Leciono

pli ol, malpli ol , pri, -ad, mis-

Deka Leciono

-us, -ema, se, Oni, pro, -aĵ, mis-

Ĝenerala Revizio

Dek-unua Leciono

Kiu tiu, iu, io Kio tio, jen, ĉirkaŭ, preskaŭ

Dek-dua Leciono

Kie, tie, ie, Kia, tia, ia, -ec, sen, laŭ

Dua Ekzameno

Dek-tria Leciono

Kiel, Tiel, Iel, kial, tial, Ial, ĉar, mem, sed, tuj, kelkaj

Dek-kvara Leciono

Kiom, tiom, iom, Kiam, Tiam, iam, Kies, Ties, ies, cirkaŭ

Dek-Kvina Leciono

Ĉiu, Ĉiuj, Ĉio, Ĉioj, Ĉie, Ĉiel, ĉiom, neniu, nenio, nenie, neniel, neniom, el, krom, sin

Ĝenerala Revizio

Dek-sesa Leciono

ig, iĝ, pra-, ankoraŭ, -uj

Dek-sepa Leciono

-inta, -anta, -onta

Dek-oka Leciono

-ita, -ata, -ota, -inda

Dek-naŭa Leciono

-inte, -ante, -onte, -ite, -ate, -ote, tra, tuj, trans

DuDeka Leciono

Spirito de la lingvo

Fina Revizio

Fina Ekzameno

Legajtoj

Legajo

Malsanoj de pluŝurso

Legajo

Kaj nun

